7-a JARO, N-o 362



LEIPZIG, 10. / 9. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

A. Filip[1] pri la moderna Hindio

„La Moderna Hindio" nomiĝas libro verkita de Andreo Filip, profesoro ĉe la jura fakultato en Ljono, kiu distingiĝis jam antaŭe per siaj laboraĵoj pri la angla sindikata movado k la laborista problemo en Usono.[2] Oni povis konstati, ke lia verko pri la situacio de l' laboristaro en Usono (skribita antaŭ la nuntempa krizo) servis speciale por klarigi la malfacilojn, en kiuj baraktas hodiaŭ la usona industrio malgraŭ la optimistaj profetaĵoj de l'admirantoj de la transatlantika kapitalismo. Kiam Filip diris, ke la materia k morala situacio de l'usona laboristo tute ne estas tiom komforta, kiel flataj legendoj rakontis, k kiam li montris, kiel la submetiĝo de l'laboristo estis la konsekvenco natura de l'eksesoj de kapitalismo, kiu perfektigis siajn metodojn ne malpliigante sian blindiĝon, estis facile konkludi, ke kiam la krizo atingus Usonon, ĝi akceptus amplekson nekompareblan k neaŭditan gravon, tiel kiel ni ĝin povas observi nuntempe.

La samajn kvalitojn de sperta observanto montras Filip en sia studo pri la moderna Hindio, kiu ampleksas tri partojn dediĉitajn al la terkultura, la industria k la politika Hindio.

La terkultura Hindio estas preskaŭ la tuto, ĉar la granda plejmulto de l' loĝantaro vivas en la kamparo k per kamplaboroj; ĝi produktas 64% el la mondproduktado de rizo, 12% el la grenproduktado, 26,6% el la kotona, 45% el la lina, k havas la jutmonopolon. Ĝia bovaro estas trioble pli nombra ol tiu de Usono, k nur Aŭstralio superas ĝin rilate al ŝafoj.

Tamen tiuj riĉoj tute ne certigas al la 320 milionoj da loĝantoj en Hindio materian bonstaton, lasante la plej grandan parton — ĝuste tiun, kiu laboras — en la plej nigra mizero. Inter la terproduktoj k ilia uzado, kiun povus k devus normale fari per ili tiuj, kiuj ilin kreis, intermetiĝas ĉiuj, al kiuj la nuntempa socia organizado donas rajtojn super la laborprodukto de aliaj. La terkulturaj laboristoj (proks. 25 milionoj) ricevas malhumanajn salajrojn. La farmistoj ŝuldas al la posedantoj (k 48% el la grundo apartenas al 8 milionoj da bienuloj) rentŝuldojn, kiuj formas 50 – 60 % el la kruda produkto. Aldone al tio la fiska depreno varias inter 10 k 15% de la rikolt-valoro. Kaj precipe oni devas aldoni la deprenojn de l'uzuristo.



Strikantaj hindaj laboristoj (strikpostenantoj).

La hinda kamparano estas devigata helpon peti ĉe l'uzuristo. Ĉar fisko k posedanto volas monricevi en la momento de l'rikolto, la rikoltanto devas prunti la sumon de sia rentŝuldo; de tiu ĉi ŝuldo li liberigos sin post vendo de siaj produktoj. Ĉar la terkultura tekniko estas tre primitiva k la musonkondiĉoj tre kapricaj, oni kalkulas, ke du jaroj el 7 estas malbonaj. Por pasigi tiujn ĉi malbonajn jarojn, la terkulturisto devas ankaŭ turni sin al la uzuristoj. Li devas ankoraŭ sin turni al ili ĉiufoje kiam okazas edziĝo en lia domo (meznombre unu fojon dum dek jaroj), ĉar ĉiu edziĝo estas akompanata de ceremonioj k festoj, fiksitaj de la religio k la kutimoj, kies kostoj reprezentas la duonon de l'jara enspezo de l'familiĉefo.

Notu, ke la procento de l'rentumo leviĝas por la monpruntoj je 18 aŭ 20 %, je 30 % por la pruntoj je greno, k ke ĝi atingas foje 50 ĝis 60 po 100, kiam la ŝuldanto prezentas malmulte da garantio, ne kalkulante la deprenon komisian de unu anno[3] po rupio[3], t. e. 6 % de l'kapitalo. Enketo permesis konstati, ke la rentum-pago por la sumoj aŭ valoroj pruntitaj de l'uzuristoj absorbas almenaŭ la kvaronon de l'rikolto. Sekve neniu kamparano havas tiom mizeregan ekziston kiel la hindia: daŭra nutromanko, malsufiĉo, malsato, teruraj epidemioj, tre alta morteco ktp. . . La plej granda parto de l'loĝantaro hindia vivas la vivon de iafoje malsatanta, sed neniam sufiĉe nutrata besto.

Kompreneble nur profunda socia ŝanĝo povas fini tiel plorindan aferstaton. Dume la situacio de l'hinda kamparano povus esti plibonigata per kreditkooperativoj (kiuj malfortigus la malbonfaran rolon de l'uzuristo), per la perfektigo de l'terkultura tekniko (kio permesus produktadon superan), per la disvolvado de l'publika instruado, (kiu fortirus la loĝantaron el nekredebla reto da superstiĉoj k paralizaj rutinoj), fine per la disvolvado de l'industrio (kiu absorbus kreskantan parton de l'nuna terkultura manlaboristaro k kreus aliajn vivrimedojn).

[1] France: André Philipp.

[2] Ekstrakto el ĉi lasta verko aperis en n-oj 250 k.s. de „S-ulo".

[3] Hinda mon-unuo.

Hindio cetere estas industriiĝanta. Detruinte la hindan metilaboron, kies prosperado minacis ĝian propran ekonomian disvolviĝon, Britio investis pli k pli konsderindajn kapitalojn en fabrik- k manufaktur-entreprenoj, unue en Bombe (Bombay), poste en aliaj urbcentroj. Tiel, depost la fino de l' deknaŭa jarcento, la koton-industrio – kiu estas la ĉefa – ne ĉesis pligrandiĝi, pasante – de 1879 ĝis 1926 – de 63 al 303 fabrikoj, de 14 500 al 135 000 teksiloj, de 1 610 000 al 8 400 000 spindeloj. Oni ne forgesu, ke Hindio havas grandegajn karb-, petrol- k ferrezervojn, neelĉerpeblajn hidraulikajn rimedojn, oron, plumbon arĝentohavan, zinkon, antimonon, stanon, manganon; ke ĝia fervoja retaro superas 50 mil kilometrojn; unuvorte, ke troviĝas tie ĉiuj kondiĉoj postulataj de la moderna grandindustrio.

Malfeliĉe por la hinda popolo, la unuaj paŝoj en tiu ĉi vojo estas markitaj k estas ankoraŭ markataj de la ekscesoj, kiujn la historio de l'okcidentaj landoj evidentigis en la unuaj periodoj de l'kapitalista ekspluatado: tre malaltaj salajroj, tre longaj labortagoj, ne kalkulante la dungon de virinoj k infanoj ĉe laboroj superantaj iliajn fortojn. Tamen ni aldonu, ke tiu ĉi naskiĝanta proletaro ŝajnas multe pli rapide marŝi ol la eŭropa proletaro sur la vojo de l'laboristaj konkeroj, tirante tiel ioman profiton el la fortostreĉoj tiusence plenumitaj de ĝiaj antaŭuloj.

Ĉi tie kompreneble prezentiĝis al la atento de Filip unu el la flankoj de l'Gandhi-a movado, tiu per kiu ĝi celas restarigi la vilaĝ-industrion k kontraŭbatali la naskiĝantan grandindustrion.

Filip montras laŭ plej trafa maniero, kian eraron signifas tiu ĉi programo. „Por Gandhi k por granda nombro da hindaj personoj, kiel Tagore, la maŝino estas instrumento de sklavigo k subpremo, kiu detruas la homan dignon k nur pliigas liajn suferojn; li do ne scias fari la necesan apartigon inter la maŝino mem k ĝia utiligo fare de l' moderna kapitalismo. La maŝino, tute male, estas liberiga potenco; ĝi fortiras la homon de l'inerto k de l'senmoveco; ĝi naskas en li novajn bezonojn k dezirojn, instruas al li la daŭran k persistan penadon, la labordisciplinon; ĝi permesas al li multobligi mireginde la nombron da produktoj ĉiuspecaj, pri kiuj li povas disponi k plibonigi tiel sian vivnivelon; fine, prezentante uzokazon por ĉiuj bonaj intencoj, ĝi pliigas la riĉon de lando k konsistigas la plej efikan batal-instrumenton kontraŭ la mizero. Se nuntempe ĝi ne produktas ĉiujn ĉi efikojn, estas pro tio ke la maŝino estas inter la manoj de Klaso, kiu utiligas ĝin por realigi profitojn je la kostoj de l'laboristoj k organizas la produktadon laŭ aŭtoritata maniero, kiu forprenas al la salajrulo ĉiun iniciatemon k ĉiun intereson pri sia laboro. Gravas do kontraŭbatali ne la industriismon, sed la kapitalismon, k por tio organizi la laboristojn, por ke ili fariĝu kapablaj konkeri perforte la avantaĝojn, kiujn la novaj teknikaj produktad-kondiĉoj devas al ili alporti."

Kaj Filip, montrinte, ke la Gandhismo respondas al reĝimo de agrikultura mastrumo, kiu estas malaperanta, memorigas pri ĉio, kion da bono alportis la kapitalismo al la homoj, k li aldonas tuj: „Oni devas iri pli antaŭen ol la kapitalismo, disvolvi en ĉiu homo la deziron al pli kompleta vivo, la senton pri la eminenta digno de lia laboro, la amon al penado k batalo, k tial la laborista sindikatismo aperas kiel movado aliel efika ol senutila k vana batalo kontraŭ la progresoj de l'industriismo".

Al la politika problemo de l'hindia sendependeco dediĉis Andreo Filip la trian k lastan parton de sia studo. Li montras ĝian ekstreman komplikon. Kastoj, religioj, klasoj tie kontraŭstariĝas. Elementoj enradikitaj de la tradicio k elementoj importitaj tie kunmetiĝas. Sentoj elirintaj de l'plej krudaj superstiĉoj k ideoj ricevitaj el la Okcidento jen ekbatalas unu kontraŭ la alia, jen interhelpas sin. Kaj ĉio tio faras la tutaĵon plej malsimplan k plej enigman kia estas imagebla.

En tion esti metinta iom da ordo k ĵetinta tiun ĉi lumon, kiu naskiĝas el la kono de l'ekonomiaj kondiĉoj estas la merito de A. Filip. *Maran.*

Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en „S-ulo" respondecas la aŭtoroj.

Georgo Bernardo Ŝa (Shaw) pri Rusio.

(Daŭrigo. Vd. la antaŭan n-on.)

Ilia sistemo estas nedetruebla (laŭvorte: nebrulebla). Neniu povus iri k vidi tion, kion ili faras, ne eĉ harditaj konservativuloj, k deziri, ke la Kvinjara Plano povu malsukcesi. *La sukceso de la Kvinjara Plano estas la nura espero de l'mondo.* Nia plano[1] certe alportas nin al la abismo, k ili tion scias tute bone. Sed aliuloj, kompreneble, eĉ se ili komprenas, ke ni estas sensaĝuloj k ne kaŝagantoj, sentas, ke sensaĝuloj povas esti tiel danĝeraj kiel kaŝagantoj, k kelkfoje eĉ pli danĝeraj. Ili scias tute bone, ke s-ro Ĉurĉil ĵetis ĉiujn britajn fortojn en la kontraŭrevolucion, k la plejeblo, kiun mi povis fari, estis diri al Stalin, ke tio ĉi estas farita sen eĉ unu voĉdono en la Parlamentejo. Ĝi estas farita per la provizoj restantaj post la Granda Milito, k la momenton, kiam li prezentis la aferon antaŭ la parlamento, li elĉifiĝis. Sed la rusoj scias, ke depost tiam aliaj registaroj elektiĝis en Anglio. Ekzemple, la registaro, kiu prirespondecis la Arkos-domrabon – domrabon, kiun bando el sensaĝaj lernejaj knaboj, ŝajnigantaj esti rabistoj, hontus fari. Kaj kompreneble, ili diras, ke ili devas esti singardaj, k mi ne povis tute precize diri, ke ili estas ĉe nenia danĝero. Mi povis diri, kio koncernas la popolamasojn, ke tiuj ne volas militon; sed ili respondas, ke la popolamasoj ŝajne ne kapablas malhelpi al tiaj s-roj Ĉurĉil-oj militiri, kiam ajn al ili plaĉas.

Estas kelkaj kontrastoj, kiuj altiras la atenton. En kelkaj rilatoj la registaro estas senkompata, en aliaj eksterordinare humana. Mi memoras, ke Lordino Astor, (kiu, preterpasante, tre interesiĝas pri la traktado al infanoj, k kiu estas konvertita de la mortinta Margareto Mk Miln[2]) diris al la rusoj, ke ili scias nenion pri infanoj. Unue, la infanoj, kiujn ni jam vidis, estis rimarkinde puraj, k neniu infano devus esti pura dum sia ludtempo. Kompreneble, je manĝhoroj k enlitiĝaj horoj estas eble dezirinde, ke ili estu puritataj, sed dum sia ludtempo nenia infano devus esti pura. Due, la infanoj eniras pro pluvfaleto. Infano devus nek scii nek sin ĝeni, ĉu pluvas aŭ ne, k Lordino Astor instigis ilin sendi iun kompetentan virinon al Anglio por studi pri infanzorgado laŭ la Mak Millan'a sistemo. Kaj tre verŝajne ili tion faros, ĉar ili ekkaptas ĉiun okazon.

Se iu homo havas ideon, ili ekprenas ĝin, k tute elprovas ĝin. Ĉiu, kiu havas novan ideon, estas fotografata k la fotografaĵo estas elpendiganta. En tiu ĉi lando ĉio ebla, kio povas esti farata por malsatigi (malhelpi) k ĝeni inventiston, estas farata. Se li eltrovas novan maŝinon, ĉiuj viroj, kiuj laboras laŭ la malnova metodo, malbenas lin. Se li eltrovas metodojn por eviti frakasiĝojn, ĉiuj firmoj, kiuj vivas per tiaj frakasiĝoj, malbenas lin. En Rusio tiu ĉi frotado malaperas.

Ni konsideru kelkajn el la plej humanaj aspektoj. La rilatoj kun la policanoj estas malsimilaj al la rilatoj tie ĉi, kvankam ili estas sufiĉe bonkor-

[1] T. e. simila plano starigota en *Britio.* – *Red.*

[2] Margareto Mk Miln (Mac Millan), pioniro por plenaeraj vartlernejoj por infanetoj en Anglio. – *Trad.*

aj en tiu ĉi lando. Usonano, kiun mi renkontis dum la veturado, komencis kapti fotografaĵojn en Leningrad. Policisto alproksimiĝis k diris: „Vi ne povas fari tion tie ĉi! mi pensas, ke estas malpermesate.“ La usonano diris, ke li povas fari, kio ajn plaĉas al li. La demando tiam sin prezentis, ĉu la usonano rompas la leĝon? Angla policisto, dubante, dirus: „Vi devas veni al la policejo k tie prezenti vian proceson al la inspektoro“. Tiu ĉi policisto diris: „Mi iros por demandi ĉe la policejo; vi atendu tie ĉi.“. Li foriris k kompreneble, la usonano, estante tenita per sia honorpromeso, atendis. Kaj la policisto revenis k diris: „Tio estas en ordo.“

Kiam Lordino Astor parolis al Stalin pri la infanoj, Stalin sin turnis kun mieno treege elokventa k diris: „En Anglio vi batas infanojn.“ Kaj mi ne kredas, ke io pli klare esprimas la grandegan diferencon inter Anglio k Rusio. En Rusio estas krimo bati infanojn. Kaj infanoj efektive akuzas siajn gepatrojn en la Polica juĝejo pro tio.

Kompreneble ne estas (ŝtata) mortpuno. *La* (laŭleĝa) *mortpuno estas absolute forigita*, k vi povas fari mortigon por tre moderaj kondiĉoj; kvar jaroj en malliberejo, ekzemple, estas proksimume la puno al mortiginto. Eble pro tre malbona mortigo estus kvin jaroj. Sed, kvankam ne estas mortpuno, estas mortpafo pro politikaj ofendoj. Se viro komencas saboti (intence fuŝi), se li komencas spekulacii, se li provas iel fari avantaĝon el la sistemo por sin riĉigi, tiam tiu viro malaperas. Post kelkaj tagoj, liaj parencoj estas informataj, ke li eble ŝatus, ke ili sendu al li nutraĵon, k post kelkaj pluaj tagoj aŭ li revenas aŭ liaj parencoj estas informataj, ke li ne plu bezonas nutraĵon, k post kelkaj pluaj tagoj ili estas definitive informataj, ke li estas mortpafita. Rilate al ĉiuj tiuj punktoj ili estas tute senkompataj.

(Finota.)

Trad. el „La Nova Gvidanto“ (The New Leader) *2978.*

JACK LONDON
en esperanto:
LA FERA KALKANUMO
Tradukis G. SAVILLE
368 paĝoj
Form. 12×18 cm
Prezo:
broŝ. 2.60 mk. g.
bind. 3.50 mk. g.
Mendu ĉe Sidejo de SAT: 23, rue Boyer, Paris XX, aŭ: Administrejo Leipzig O 27

LA FONTO DE SENLABORECO

(Daŭrigo. Vd. n-ojn 357/361.)

Nun, ni ankaŭ povas respondi la demandon: „Kiel ni forigu la senlaborecon?“ La mallonga respondo estas:

Forigo de l'ter-monopolo!

Dispartigo de l'granda ter-propraĵo!

Tiun vojon montris al ni krom Rusio **Bulgario.** En la jaro 1920, la tiama kampula registaro *Stamboliski* dekretis leĝon pri ter-propraĵo. Per ties realigo la grandaj bienoj privataj k ekleziaj estis dispartigitaj inter la malgrandaj bienuloj, kiuj antaŭe ne havis sufiĉe da tero. Krome la ekspluatado per la kartelitaj tabak-aĉetantoj estis forigita per kooperativa organizado. La rezulto: En Bulgario tiam ne ekzistis senlaboreco; la salajroj estis meze 120 levoj po tago. Sub influo de l'demokrata fantomo, ke la plimulto de l'voĉoj estas potenco, la registaro *Stamboliski* 1923 senarmigis sian anaron; nun la reakcio kun helpo de la armeo kaptis la registaron, buĉigis *Stamboliskin* k dekmilojn de kamuloj. La tero estis redonita al la posedantoj de l'iamaj grandaj bienoj; nun ekzistas ree senlaboreco, la salajroj estas 30—40 levoj tage, la tabak-aĉetantoj povas ekspluati ree la produktantojn.

Ankaŭ *Meksikio* montras al ni la ĝustan vojon. Ĝiaj revoluciuloj klopadas realigi tiun celon per konsekvenca, longdaŭra laboro.

Ĉar ne sufiĉas nura forpreno k dispartigo de l'grandaj bienoj, de l'granda ter-propraĵo. Tion spertis Rusio: Tie la malriĉaj kampuloj ja ricevis teron, sed ili ne posedis brutaron nek laborilojn. Tial ili farmdonis la teron al la riĉaj kampuloj k laboris ĉe tiuj kiel kamplaboristoj. Tiel ili falis ree en dependon de l'riĉaj kampuloj; nur tiel povis estiĝi la *kulak*aro.

Ne sufiĉas dispartigi la grandan terpropraĵon. Krom tiu negativa rimedo pozitivaj rimedoj estas necesaj por forigi la terurajn efikojn de l'jarcenta subpremado ĉe la kamparanaro, ĉe la laboristaro. Oni devas konstrui novajn domojn, novajn stratojn k vojojn, oni devas plibonigi la eluzatan teron, devas havigi terkulturajn maŝinojn ktp.: oni devas venki la servutemon k nekleron de l'homoj. Nur, se tio sukcesas, la baro de l'tero estos forigata finfine.

Ĉi ĉio estas malfacila k kostas multe da mono. Sed ĉio ĉi ne estas neebla. Ja, la realigon de tiaj rimedoj oni povas komenci jam nun, sub la kapitalista sistemo. Ekzemple, dispartigo de grandaj bienoj k enlanda koloniigado estus dankinda tasko de l'sindikatoj, tasko, kiu ja akcelas ilian taskon plibonigi la laboristajn viv-kondiĉojn. Tio estus komenco. Sed la definitiva forigo de l'termonopolo estas ebla nur sub socialista registaro.

Unuavide, nia propono ja ŝajnas nura reformo. Sed, ĉu estas ebla la senpropraĵigo de l'grandaj posedantoj de tero per nura reformo? Laŭŝajne jes! En Germanio ekz. necesas nur duonigi la limimpostojn por greno; tiam oni povus akiri milionon da hektaroj preskaŭ senpage; ĉar, „triono el niaj grandegaj bienoj estus bankrotonta sen la impostoj“ konstatis la gvidanto de l'instituto por esplorado de l'vend-cirkonstancoj por terkulturaĵoj en Stutgarto. Kaj en Germanio k la orienteŭropaj ŝtatoj ekzistas jam nun limigata enlanda koloniigado. Sed nur pro naciaj motivoj k tiagrade, ke la kapitalista karaktero de l'ekonomio ne estas endanĝerigata. Efika senpropraĵigo de l'granda terpropraĵo estas ebla nur per revolucio. En Rusio la senpropraĵigo de l'posedantoj de grandaj bienoj estis la unua k plej grava rimedo de *Lenin.* En Bulgario, la reakcio faris la malon. En Meksikio la revoluciuloj konkeris la potencon post sangaj bataloj; tiam ili komencis dispartigi la grandegajn bienojn. En Ĉinio, jam de jaroj furiozas batalo pro la ter-problemo. En Hindio minacas malantaŭ la politikaj bataloj inter Britio k la hinda Kongres-partio pri la konstitucio la agrara revolucio.

Tri **kontraŭ-argumentojn** oni povas fari:

1) **Ne ekzistas sufiĉe da tero,** por koloniigi la milionojn da senlaboruloj.

Sed, ja ne estas necese koloniigi *ĉiujn* senlaborulojn. Jam per la koloniigado de parto de l'senlaboruloj estas kreotaj novaj aroj da konsumantoj por industriaj produktoj; per tio pliaj industri-laboristoj havas laboron, kiuj nun siavice estas aĉetantoj por terkulturaj k industriaj produktoj.

Krome ekzistas en la mondo ankoraŭ tre grandegaj nekulturataj areoj. Sed ne atentante tiujn, ni nur komparu la denson de l'loĝantaro inter distrikto el grandaj bienoj k distrikto kun malgrandaj k mezaj bienoj, ekz. orientan Germanion kun okcidenta Germanio. La terkulturo estas en ambaŭ preskaŭ la sama. Tamen vivas en Hesen-Nasaŭ 145 homoj sur kvadrata kilometro, male en orienta Prusio nur 66 k en Pomeranio nur 59, parte eĉ nur 27. Ankoraŭ pli granda estas la diferenco, se ni komparas tian distrikton kun distrikto de disvolvita terkulturo kiel Nederlando; tie loĝas sur kvadrata kilometro 226 homoj, en la distriktoj kun ĝardena kulturo eĉ 500—600. Per tio ankaŭ la kontraŭ-argumento de *Kolin Ros* estas maltrafa: ĉi tiu skribas pri Bali: „Kiam la lasta parcelo de l' nekulturita tero estos okupata, tiam

finiĝos ankaŭ la nunaj liberaj k feliĉaj formoj de l'vivo.“ Ankaŭ tiam plibonigo de l'terkultura tekniko kreas viveblon por nombrego da homoj, kvankam tia plibonigo ne estas nelimigita. Por la venontaj jarcentoj certe ne mankas tero.

2) **La agrara krizo:** „Jam nun la terkulturistoj ne povas vendi siajn produktojn! Kiel estiĝos la situacio tiam?“ La argumento estas prava ĉi-rilate, ĉar ampleksa koloniigado povas kaŭzi dum kelka tempo ankaŭ malfacilojn ĉe vendado de l'produktoj. Sed kiel estas nun la situacio? La greno putras, dum milionoj da homoj malsatmortas, ĉar ili ne povas aĉeti manĝaĵon.

La agrara krizo estas ĉefe teknika krizo k krizo de l'gren-kulturo k de tiaj produktoj, kiuj estas produktataj pli profitodonaj en meĥanikigita granda produktado. Dum la milito greno estas pagata altpreze; pro tio la areo por produktado estis pligrandigita. Post la milito la prezoj malaltiĝis. Samtempe iĝis ebla je malalta prezo la kulturado de ĝis nun nekulturita tero per maŝinoj. Per tio la areo por produktado estis pligrandigita plie. La prezoj malaltiĝis tiom, ke la ĝisnunaj grenkulturistoj ne plu povis konkuri; nur ŝirmitaj de impostoj ili povas konservi siajn entreprenojn. Tio montriĝas ankaŭ per tio, ke landoj kun bona terkulturo, precipe tiuj, kiuj kulturas ĉefe legomojn, fruktojn k florojn, suferas relative malmulte senpere pro la krizo, sed pli pro malfaciloj ilin eksporti, pro altaj k ofte sensencaj limimpostoj.

Se ni, per forigo de l'ter-monopolo k sistema koloniigado de l'ĝis nun maldense loĝataj distriktoj de granda terpropraĵo, kreas fortan enlandan merkaton, tiam kreskas konforme kun la pligrandiĝanta loĝantaro k bonfarto la demando pri legomoj, fruktoj ktp. unuflanke; aliflanke plialtiĝas la demando de l'kamparanaro pri industriaj produktoj.

3) **La laboristoj ne reiros al la kamparo!** Tio estas la tria kontraŭ-argumento. Sed, ĉe la dispartigo de l'grandaj bienoj ja ne temas pri tio konduki reen grandan nombron de industriaj laboristoj al la kamparo. Per ĉi tiu rimedo ni volas ĉefe malhelpi, ke la senteraj kamparanoj migru en la urbojn kiel laboristoj. Certe ekzistos ĉiam homoj, kiuj preferas vivi en urbo. Sed same ekzistas multaj homoj, al kiuj plaĉas ankaŭ la trankvila, malrapida vivo sur la kamparo. Per plialtiĝanta bonfarto de l'kamparanoj certe estas eble venki ankaŭ sur la kamparo la ĝisnunan kulturan neprogresemon; prezentado de filmoj k teatraĵoj, koncertoj, paroladoj ktp. povas okazi ankaŭ sur la kamparo, kiam ekzistas sufiĉe da vizitantoj. Ekzemplo estas iagrade Danio, kie la spirita vivo de l'vilaĝanoj estas pli vigla k pli altranga ol en aliaj landoj.

LITERATURO:
germanlingva:
Komparu: *Franc Openhajmer:* „La granda terpropraĵo k la socia problemo.“ Jena 1922.
„Kapitalismo, komunismo, scienca socialismo.“ Jena 1919.
Krome: „ISK“ n-o 7, julio 1929.
„Frankfurta Gazeto“ n-o 248, 2. 4. 1931.

Vetig (16900), Gelnhaŭsen (Germ.).

Unu el la interesegaj popularsciencaj broŝuroj eldonitaj de SAT-Kooperativo estas

SEKSPSIKOLOGIO

Originale verkita de S. ZIEGLER.

Serioza traktaĵo bazita sur la esploroj de la moderna psikoanalizo. 54 pĝ. Form. 11×14 cm. Prezo 0,60 mk. g.

Administrejo de SAT Leipzig O 27, Colmstraße 1

Urbo k kamparo.

Laŭ la lasta statistiko en Anglio k Kimrio estas konstatita nova plimultiĝo de la urba loĝantaro proporcie al la kampara loĝantaro. Kvar kvinonoj de la loĝantaro loĝas en la urboj, *k unu kvarono de la loĝantaro estas koncentrita en la dektri plej grandaj urboj.* Unu kvinono nur el la loĝantaro loĝas en la kamparo. Unu kvarono el la urba loĝantaro (aŭ kvinono el la

Eksterordinaraj tagoj el mia vivo.

(Impresoj pri tendara vivo en la Ruĝa Armeo.)

(Fino. Vd. antaŭan n-on.)

Ĉiuj do dum la militstudado okupas sin pri sia speciala fako de tiu studado. Ni studis ankaŭ kanonojn en la artileria parko k praktikis ilian uzadon dum provbatalo.

Poste okazis elveturoj ekster la tendaron por manovraj provaj bataloj, kiel artilerio kune kun infanterio k batalaj pafadoj. Mi dekomence tre malbone sentis min sub la disciplino k diversaj novaj kutimoj, sed iom post iom alkutimiĝis.

Dum unu prova artileria manovro, mi dum rapida rajdado hazarde preskaŭ falis sub la radojn de l'kanono, kie certe mi estus pereinta. Infanteriaj rotoj plej grandan parton de sia studado okupas sin ekster la tendaro, aranĝante militajn marŝojn, pafadojn ktp. En la tendaro la ruĝarmeanoj faras ĉion mem, do tie estas deĵoroj noktaj kun fusilo en la artileria parko, kun sabro ĉe la ĉevalejo, ĉe armilar-deponejo ktp.; aliaj laboras en la kuirejo, senŝeligante po kelkaj sakoj da terpomoj, hejtante fornojn, preparante ĉion por kuirado, kiel akvon, lignon ktp. Certe ĉi tiu laboro estas peza, oni devas dumnokte ne dormi k penige labori, sed oni devas alkutimiĝi al ĉio.

Mi spertis ĉiujn deĵorojn laŭvicajn, punajn mi ne havis. Oni deĵoras k laboras laŭ sia vico, same ankaŭ ekzistas ekstervicaj deĵoroj, al kiuj oni sendas tiujn, kiuj faris iajn malobeojn k ricevas ilin kiel punon. Al disciplino oni alkutimigas iom post iom, k se iu malobeis, ne sciante ankoraŭ ĉiujn armeajn regulojn, oni nur klarigas, kion oni ne devas fari, sed ne punas. Certe, kiam ĉiuj jam konas la regulojn k malobeas intence, oni tiam punas. Tion faras la komandantoj. Ili ankaŭ devenas el la laborista k kamparana loĝantaro. Pro tio ili rilatas al la ruĝarmeanoj kamaradece.

Al ĉiuj ruĝarmeanoj oni faras inokulojn kontraŭ kelkaj infektmalsanoj, por ke neniu malsaniĝu. Ambulancon la malsanaj vizitas dum ripoztempo. Ĉiutage da nutraĵoj ĉiu ruĝarmeano devas ricevi jenajn (pezo en gramoj): da pano — 1000 aŭ da faruno sekala — 750; da grio — 150; da makaronio aŭ vermiĉelo — 10; da grasoj — 35; da legomoj freŝaj — 440; da viando aŭ fiŝo — 375; da faruno por supo — 20; da salo — 30; da pipro — 0,7; da laŭraj folioj sekaj — 0,3; da sukero — 35; da teo por monato — 65; da sapo por monato — 200. Certe oni tiujn necesajn produktojn utiligas por kuirado. Certe la manĝaĵoj ne estas diversspecaj, ili estas preskaŭ samaj ĉiutage, t.e. vianda supo kun terpomoj aŭ brasiko aŭ grio, poligon-gria aŭ miligria kaĉo kun oleo aŭ graso, pano sekala, teo kun sukero. Matene estas donata supo kun pano k kaĉo. Ĉiu laŭvice ricevas siajn manĝaĵojn el la kuirejo. Ĉiu havas kupran kaldroneton, en kiun li ricevas la manĝaĵojn k el kiu li manĝas; poste oni ilin purigas per sablo. Ili ĉiam devas esti puraj. La tutan tempon oni pasigas en libera aero, en la tendoj oni nur dormas. Ĉiu ruĝarmeano ricevas kiel salajron 1 rublon 45 kopekojn monate. Kiam oni foriras al militservo, la oficloko apartenas al la foririnta; salajron dum la unua jaro de l'militservo, por tri monatoj, oni ricevas dusemajnan, dum pluaj jaroj por unu monato — mezan monatan salajron.

En ĉiu roto, aŭ baterio, divizio, ekzistas *Lenin-angulo* (tendo), en kiu oni faras kulturan laboron. Tie estas bibloteketo, havanta primilitajn k aliajn librojn. Por la legejo estas abonataj diversspecaj gazetoj k ĵurnaloj, kiel la ĉefurbaj (centraj); same ankaŭ provincaj (militaj k civilaj), estas eldonata murgazeto kunfaldebla, por ke oni povu uzi ĝin dum militiroj; al ĝi kun-

tuta loĝantaro), t.e. ekzakte 8 208 818 personoj, estas koncentrita en la Londona aglomeraĵo. La tuta angla kamparo ne havas pli da loĝantoj ol la sola ĉefurbo!

Tio estas la kapitalista disvolviĝo antaŭenigita al la plej ekstremaj limoj. Kvankam en malpli granda mezuro, tiu ĉi procezo daŭras en ĉiuj kapitalistaj landoj. Anglio, Belgio, Francio, Germanio, Japanio k Usono en sia tuto konsistigas la urbon, k kontraŭ tiuj ĉi landoj, la cetera mondo reprezentas la kamparon. Ne estas senutile insisti pri tiu ĉi aspekto de l'kreskanta antagonismo inter tiuj ĉi kelkaj metropoloj k la grandega „tutmonda kamparo", ĉar, esence, la koloniaj movadoj reproduktas nur en giganta k universala skalo la batalon, kiu karakterizas la kapitalisman sistemon ekde ĝia origino k kiu kondukas al la submetado k absorbado de l'postrestanta kamparo fare de la kapitalista urbo.

Tiuj ĉi pripensoj estas necesaj por taksi ĝuste la koloniajn movadojn sen iluzio. La ribelo de l'subpremata tutmonda kamparo kontraŭ la metropoloj povas multe malfortigi la kapitalismon k rapidigi ĝian falon; sed la konstruaj fortoj, kapablaj krei la socialisman socion, povas ŝpruci nur el la urbaj, industriaj aglomeraĵoj, kie la kapitalo koncentrigis depost pli ol jarcento la materiajn k intelektajn kondiĉojn por la realigo de l'socialismo.

La klasbatalo tra la mondo

El Latvio.

Dum la komenco de oktobro okazos en la tuta lando parlament-elektoj. Samtempe daŭras la blanka teroro. Dum ĉiuj elektoj la burĝaro elpensas diversajn motivojn por plifortigi la teroron. Membroj de la socialdemokrata partio, kiuj dubas pri la batalemo de siaj gvidantoj k postulas fini kompromisan politikon kun la burĝaro, estas eksmembrigataj k denuncataj kiel komunistoj, ŝtatdanĝeraj personoj. Tial komenciĝis opozicia movado en la partio. La amasoj laboristaj maldekstriĝas ankaŭ sekve de la pligrandiĝanta senlaboreco. La rolo de l'socialdemokratoj en Latvio ŝajnas finita, ĉar ĉe elektoj al

provizora parlamento (1920) ili ricevis
274 877 voĉojn, 58 deputitojn,
unua konstitucia parlamento (1922)
244 356 voĉojn, 31 deputitojn,
dua konstitucia parlamento (1925)
266 719 voĉojn, 33 deputitojn,
tria konstitucia parlamento (1928)
231 612 voĉojn, 26 deputitojn.

En la elektoj al la unua k dua parlamento la maldekstruloj ne partoprenis; iliaj listoj estis malakceptitaj k la preparantoj arestitaj. En la elektoj al la tria parlamento la maldekstrula listo estis akceptita en tri voĉdonregionoj, k en du malakceptita. Por la nun okazontaj elektoj la listo estas akceptita por ĉiuj regionoj. La burĝaro diverse malhelpis al preparado de la listo. En la ĉefurbo Rigo estis arestitaj 90 gelaboristoj, kiuj venis por subskribi la liston. En la provinco Latgalio ankaŭ okazis arestoj; inter la arestitoj eĉ estis neplenaĝuloj. En tiu provinco la pastraro k socialdemokratoj havas la monopolon aranĝi leĝajn amaskunvenojn. La eklezio protektas ĉiujn ĉarlatanojn, inspirante per sankta teruro la malkleran popolon, ke ĝi voĉdonu por ĝia listo. La 16-an de aŭgusto okazis en la urbo Kreslava amaskunveno aranĝita de socialdemokratoj. Dum ĉi tiu la maldekstrulo Jerŝovs, deputito de l'laborist-kamparana frakcio en la parlamento, petis la parolrajton. Tiam la polico fermis la kunvenon k komencis dispeli la amason. Jerŝovs daŭrigis paroli sur la strato, aŭskultate de l'amasoj; la policanoj ne sukcesis dispeli la popolamason. Poste, kiam alvenis policrezervoj, Jerŝovs estis arestata. Post tiu okazo la popolo ĉirkaŭis la malliberejon, postulante liberigi Jerŝovs, ĝis fine tiu deziro estis plenumata. La amasoj atendantaj akompanis lin. En la Latgalia provinco de Latvio regas tiaj „demokratiaj" kondiĉoj. Sed Latgalio aŭdas, ke malantaŭ la ŝtata limo en najbara laborista ŝtato (Sovetio) bruas traktoroj k la laboristaro scias, por kio oni devas batali.

A. N. (17 457)

---

laboras ruĝarmeanoj, k ankaŭ komandantoj same. (Mi ankaŭ kunlaboris al ĝi). Tiu kultura laboro estas farata dum eksterlerna tempo.

Ekzistas diversaj rondetoj: de pafsporto, sendiuloj, militpreparado, studado de l'kvinjara plano, de popolmastrumado ktp. Por pli vigle k pli bone studi la militsciencon, ni ĉiuj inter ni aplikis socialisman konkuradon. En regimento ankaŭ ekzistas tia klubo, kie estas scenejo. La sidlokoj estas sentegmentaj. Tie oni aranĝis kelkfoje kunvenojn, spektaklojn, en alia loko en „sentegmenta kinejo" oni prezentis filmojn. Ekzistis tendoj, nun oni konstruas iom post iom lignajn konstruojn por tiuj Lenin-anguloj. La ruĝarmeanoj rilatis al la militservo konscie k bone. Certe en la tendaroj kune kun ruĝarmeanoj de l'teritoria servo troviĝis ankaŭ ruĝarmeanoj de l'efektiva servo. Da tiaj tendaroj ekzistas kelkaj por diversaj teritorioj. En nia tendaro ankaŭ estis kooperativaj butikoj, kie oni povis aĉeti diversajn necesajn varojn.

En fino de julio (1929) okazis militparado, dum kiu ĉiuj nove rekrutitaj ruĝarmeanoj akceptis solenan promeson pri sia fidelo kiel laboruloj al la laborista-kamparana registaro. Al tiu festo nin vizitis multaj ekskursantoj: laboristoj k oficistoj k personoj el kelkaj „fabrikoj k oficejoj protektantaj al ruĝarmeaj armeformacioj" („ĉefoj"), kiuj veturis al ni el la urbo.

Parencoj el la urbo ankaŭ multaj vizitadis, tio ne estis malpermesita.

Estis certe mankoj k difektoj en la vivo de l'tendaro, tio estas: nesufiĉo da higieno, ĉar ne ĉio ankoraŭ estas finkonstruita, do akvo en sufiĉa kvanto mankis. Oni kondukis nin por lavi al kamparanaj ŝvitbanejoj, ne tro oportunaj k malpuraj, je 3-kilometra distanco de l'tendaro. Ĉiu devas sin lavi ne pli ol 15 minutojn. En la regimenta ambulanco la medicinesploro al malsanuloj estis kelkfoje supraĵa, estis donataj nesufiĉaj kuraciloj. Rezulte, ĉar dum la somero de 1929 la vetero estis sufiĉe malvarma k pluva, ni en simplaj tolaj tendoj certe sentis nin sufiĉe malvarmaj. Mi malvarmumis k treege tusis, sed la kuracistoj tion ne atentis, ĉar mi ne havis febrostaton, kiam mi vizitis la ambulancon, sed kiun mi havis dum noktoj. Do oni ne liberigis min, nek de l'okupoj, nek de l'deĵoro. Reveninte hejmen k vizitinte kuraciston en urba ambulanco, mi do konstatis, ke mi havas akutan bronkiton k mi devis kuŝi en la lito pli ol unu semajnon k ne labori. La vestoj ankaŭ ne estis bonaj, ĉar ĉiuj vestoj havas sian difinitan limtempon por uzado, do al nia vico trafis vestoj de jam lasta limtempo de uzado, certe tre eluzitaj, truhavâj, ŝtopitaj, kiujn oni ofte devis poste ŝtopi dum la uzado. Novaj estis nur la manteloj (kapotoj, ruĝarmeaj paltoj).

La ŝvitbanejon ni vizitis ĉiudusemajne, k ĉar la rivero ne estis proksima de nia loko (je 5-kilometra distanco), do ni nin sentis certe ne sufiĉe puraj, konsiderante, ke la akvo ne sufiĉis k dum marŝoj aperis multe da ŝvito k polvo sur niaj vestoj k korpoj.

Oni devas ĉi tie ankaŭ noti, ke nia laborista k kamparana junularo ne estas tiel konscia k kultura ankoraŭ, malgraŭ ĉia kulturado. Tre malplaĉis al mi tio, ke preskaŭ ĉiuj insultis per la „patrina" insulto (ruse „mat"), la plej forta seksa insulto. Mi notis pri tio, por forigi ĉi tiun nekulturaĵon, en la murgazeto, sed tio bedaŭrinde havis preskaŭ nenian influon.

En komenco de aŭgusto ni kolektis nian havaĵon k frumatene forlasis la tendaron por cedi lokon al niaj posteuloj. Ni ricevis forpermeson ĝis la sekvanta somero.

Tiel pasis miaj eksterordinaraj tagoj en la Ruĝa Armeo, k mi komencis denove vivi ordinarajn simplajn taĝojn.

Vjaĉeslav V. Kalaŝnikov, Niĵni-Novgorodo.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la liberpensuloj.

Okazis dum la Amsterdama Kongreso *liberpensula fakkunsido*, kiun partoprenis 21 Gek-doj: El Germanio 8, Nederlando 5, Anglio 3, Francio 2, Aŭstrio 1, Ĉeĥoslovakio 1, Usono 1.

Bedaŭrinde nek la sekretario de la sekcio nek la redaktoro de la „Liberpensula Paĝo“ en „S-ulo“ ĉeestis. Eĉ ne alvenis iu raporto de la respondeca K-do pri la nuna stato de la liberpensula movado en SAT. Pro tio unue necesis, elekti novan sekretarion. Estis elektata K-do *Adolf Waldmann, Bremen, Illerstr. 8 (Germ.).*

La sekvintaj pritraktoj temis pri la farenda laboro. Por ke la liberpensula servo en SAT povu funkcii, ĝia organizado devas esti sufiĉe bona. Ni bezonas perantojn, kiuj havas kontakton kun la liberpensuloj en la diversaj landoj. La perantoj — k memkompreneble ankaŭ ĉiuj aliaj Gek-doj k organizoj liberpensulaj — estas petataj, provizi la sekretarion regule per materialo, por ke li denove regule povu eldoni „Liberpensulan Paĝon“ en „S-ulo“. Gek-doj, kiuj volas helpi kiel specialaj raportantoj liberpensulaj, bonvolu anonci sin ĉe K-do Waldmann.

Plie oni proponis aranĝi enketon pri la diverslandaj kondiĉoj rilate la eksiĝon el la eklezio. — Interesa ankaŭ estis la atentigo de la reprezentanto el Nov-Jorko, ke proksiman jaron en Ĉikago okazos granda ekspozicio, aranĝota de diversaj eklezioj, k ke la tiea liberpensularo planas efikan kontraŭmanifestacion.

Fine oni interkonsentis pri la raporto de la kongreso k fakkunsido. Preskaŭ ĉiu partopreninto prenis sur sin la respondecon, raporti en al li konata liberpensula gazeto nacia.

Do, seriozaj liberpensulaj Gek-doj, al la fronto!

Post unu jaro ni volas vidi sukceson.

Arbarulo (11761).

Ĉu negraj gvidantoj lernis esperanton?

„Unu el la strangaĵoj pri ĉi tiu edukado estas, ke Moskvo instruis siajn lernantojn paroli esp-on, k ĉi tiu lingvo estas uzata de la gvidantoj en iliaj oftaj kunvenoj“.

La supra aserto farita de iu negra detektivo troviĝas en fruntartikolo el *Los Angeles Times* (Tempoj) de la 4. aŭgusto. Pri la ĝenerala enhavo la multaj titoloj sciigas nin. Grandlitere trans la paĝon ni legas:

„Tri mortigitaj, dum negraj ruĝuloj batalas kontraŭ policistojn.“ Sekvas jenaj subtitoloj: „Tumultoj furiozas en Ĉikago. Policistoj vunditaj batalante kontraŭ popolaĉon. Du mil komunistoj haltigas eldomigon de negra familio. La Ĉikaga urbestro petas, ke oni soldataron pretigu kontraŭ plua maltrankvilo.“

Laŭ la artikolo, almenaŭ 25 organizantoj en Ĉikago estis instruitaj en Moskvo. Mi ŝatus scii, kial tiom da lab. esp-istoj sian ekziston neniam konigis. Se la tuto estas invento, kiaj motivoj?

16285.

TRA LA MOVADO

KRONIKO

Finlando. La Laborista Turista Societo en *Helsinki* (Sirkusk. 3 B 27) estas unu el la organizoj, kiuj uzas esperanton. Notu! — Germanio. *Boĥum*. La 11. 8. okazis kunveno de la SAT-rondo. La ĉefa punkto estis, ĉu aliĝi al LEA. K-do Maares raportis pri la LEA-konferenco k memorigis, ke la parolintoj atakis K-don Kolodzinski (8270) Boĥum, tial ke en Boĥum ne ekzistas LEA-grupo. K-do 8270 respondis, ke ne estas eble reveni al LEA, ĉar ĝi estas komunista. En la voĉdonado, ĉu LEA-grupo aŭ SAT-rondo, la plej granda parto estis por SAT. La membraro decidis, laŭ propono de K-do Kolodzinski, mendi por la membraro ekde septembro „La Lernanto“-n. (8270).

Kun la n-o 360 de „S-ulo“ ni dissendis la voĉdonilojn al ĉiuj validaj, aktivaj membroj de SAT. Kiu ne ricevis sian voĉdonilon, senprokraste postulu de la Administracio.

Radio k esperanto.

Laŭ la nuna stato disaŭdigas regulajn esp-ajn sciigojn, ĉu kursojn, ĉu novaĵojn aŭ la semajnan programon: 8 radio-stacioj en Germanio, 4 en Francio, 2 en Holando, 3 en Sovetio k la stacio en Dancigo.

Plendo.

En n-o 341 anoncis pri PM-interŝanĝo K-doj Nadal el Palma k Turĉik el Preŝov. Ambaŭ ne respondis ĝis hodiaŭ al sendo de PM, farita al ili de K-do Kolodzinski (8270), Boĥum. Estu avertataj la K-doj kontraŭ tiaj malseriozuloj k malutilantoj en niaj vicoj, kiuj „garantias respondon“ k ne respondas!

MEMORNOTO

Represis el „S-ul-o“:

Volksblatt, Boĥum, 15. 5., Naturamika renkont. (349); *Libera Socialisto*, Rotterdam, 26. 8., Klasbat. tra la Mondo (357/358), en esp. k hol.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Freie Sportwoche, Leipzig, 17. 8.; *Gazetservo de Lucerna Sportintern.*, n-o 37 (19. 8.); *Münchener Post*, 24. 8. (speciale pri la monafero SEU); *Schwäb. Volkszeitg.*, Augsburg, 24. 8.; *Volksblatt*, Boĥum, 4. 8., 11. 8.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 20. 8.; *Paris-Midi*, 26. 8.; *Volksblatt*, Boĥum, 2. 5., 13. 5., 14. 5., 26. 5., 29. 5., 3. 6., 9. 6., 21. 7.; *Westf. Volkszeitg.*, Boĥum, 14. 5., 3. 6., 8. 6., 20. 8.; *Boĥumer Anzeiger*, 3. 6.; *Volkszeitg.*, Herne, 21. 7.; *Volkswacht*, Witten, 21. 7.; *Volksstimme*, Wattenscheid, 21. 7.; *Freie Presse*, Wanne-Eickel, 21. 7.; *Ruhr-Echo*, Essen, 25. 7. (en esp-o); *Solidarität*, Offenbach, 1. 6.

NIA POŜTO

16 652. — La apostrofigo estas kelkfoje malĝuste aplikita de vi; nur „o“ estas apostrofebla en versaĵo (ne „on“, „aj“ ks.)! En la dua linio devus esti „sia“ (ne „ilia“)! Provu ĝin reprilabori! La lingvajn dem. ni respondos en „L. L.“. *Red.*

NEKROLOGO

Post longdaŭra malsano mortis je la 3. VIII. 1931 nia kara Sovetia K-do

TIĤON GOLOVIN (SAT-ano 7442, aktiva).

Fervore li laboris en sia loko por la disvastigo de esp-o. Kiel instruinto de nia lingvo li restos neforgesebla por multaj Gek-doj.

16 899.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Josef Böhm, *Bergesgrün, 142 ap. Brüx*, kĉl, pri div. temoj, L, PK, PI, PM.

GERMANIO

K-do Moritz Eisenstein, Hauptpostlagernd, *Chemnitz*, interŝ. PI, PK, PM, gaz., fotojn. Nepre resp.

K-do Kurt Graupner (20 j.), Feldstr. 15. *Falkenstein/Vogtl.*, kun Gek-doj el Anglio, Usono k Kanado.

K-do Karl Nejedli, Friedrichstr. 18, *Penzig O/L*, interŝ. PI, PK kun Gek-doj ĉiulandaj. Ĉiam resp.

K-do Franz Luthardt (fervojisto), Hallische Str. 220, *Leipzig N. 23*, kĉl, L, PK, PI. Tuj respondos.

— Gek-doj dez. koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Skribu al: K-dino Flora Häntzschel, *Lichtenhain*, Nr. 15, F. (Sächs. Schweiz).

NEDERLANDO

— Dum mia biciklo-vojaĝo mi petas porpagan gastrestejon ĉe K-doj laŭ jena vojo: Bentheim — Berlin — Leipzig — Hirschberg — Warschau — Minsk. Skribu al: K-do S. J. Evenbly, Badhuisstr. 103, *Scheveningen*.

Pli bona esperantisto vi volas fariĝi? Tiucele nur partoprenu Superan esperanto-kurson perleteran. Postulo senpagan enkondukon! Adr.: Leono Funken, diplom. esp.instruisto, Moselweisserstr. 20, Koblenz, 52 (Germanio).

Atentu! Atentu!

La esperanto-grupo en Bruck a. M. aranĝos de 3. ĝis 4. oktobro ekspozicion por varbi novajn anojn. Gek-doj ĉiulandaj, helpu pligrandigi nian ekspozicion per alsendado de multnombraj L, PK, PI ktp. Nia grupo tuj k certe resp. Adr.: K-do Josefo Tröls, Ferd. Hanuŝgasse 17, *Bruck a. M. (Aŭstrio).*

ENHAVO

paĝo

A. Filip pri la moderna Hindio 389—390
Georgo Bernardo Ŝa (Shaw) pri Rusio . . . . 390—391
La fonto de senlaboreco . . . 391—392
Urbo k kamparo . . . . 392—393
Eksterordinaraj tagoj el mia vivo 392—393
La klasbatalo tra la mondo . . 393
Tra Esperantio 394
Korespondado 394

Presejo: Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)